

Heinrich Heine,
 En la mirida bela Maj'
tradukita de Kálmán Kalocsay

En la mirinda bela Maj',
 dum sin burĝonoj fendis,
 en mia kor' la amon
 mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',
 dum birda tril' ne ĉesis,
 al ŝi sopiron mian
 konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocajo, *1911 – †1976).*

Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)

Heinrich Heine,
 En dolĉega Maj'
tradukita de Friedrich Pillath

Printempe en dolĉega Maj',
 Dum la burĝonoj krevis,
 El mia koro ĝerme
 Amsento sin ekleviſ.

Printempe en dolĉega Maj',
 Dum birda kanto sonis,
 De l' kora mi sopiro
 Konfeson al ŝi donis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de FRIEDRICH PILLATH (†1932-04.03).*

Arg-203-434 (2015-04-09 15:05:52)

Tiu ĉi traduko aperis en Elektitaj Poemoj, Berlin: Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek (2a eldono), 1920, p. 13. La origina germana-lingva versio troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. Pri F. Pillath vidu ankaŭ la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Friedrich_Pillath.